

ESPERANTO

KAJ KULTURO

Internacia Pedagogia Revuo

Aperas monate sub la aŭspicio de la
FRANCA ASOCIO DE ESPERANTISTAJ EDUKISTOJ
(G. E. E.)

Redakto - Sekretario :

D-ro Andreo ALBAULT
11, rue des Feuillants
Toulouse (Francio)



Eldono - Direktoro :

H. MICARD, Emerita Instruisto
Epineux - le - Séguin (Mayenne)
Francio

N^o 1
JANUARO
1957

Jara abono : 400 fr. fr., pagenda en Francio al
Edmond BIDOIT, 6, rue de la Paix, Baugé (M-et-L.), Francio.
Post-cek-konto : 143-867 Nantes ;
aŭ al la landaj perantoj de I.P.R. (vidu 2-an kovrilpaĝon)
aŭ al la landaj perantoj kaj delegitoj de U.E.A.



Informoj el niaj Asocioj

Ni opiniis ke la aperigo de la jenaj informoj utilos al niaj legantoj.

I.L.E.I.

Funkciuloj por la periodo 1955-58 :

Prezidanto : F-ino J. DEDIEU, 70, Av. Victor-Ségoffin, *Toulouse, Francio*.

Sekretario, Kasisto, Gvidanto de Centra Oficejo : F-ino Violet C. NIXON, 183, Woodlands Park Road, Bournville, *Birmingham, 30, Anglio*.

Konsilantoj : S-roj HEITMÜLLER, SVANTESSON, TACCANI.

Membro-Asocioj :

Aŭstrio, Britio, Francio, Germanio, Italio, Suomio, Svedio.

Aktivaj reprezentantoj en aliaj landoj :

Aŭstralio, Belgio, Danlando, Irlando, Izraelo, Japanio, Jugoslavio, Kanaria Insularo, Maroko, Norvegio, Portugalio, Urugvajo, Usono.

G.E.E. (800 anoj) (franca asocio) *

Prezidanto : F-ino J. DEDIEU, Licea Lingvo-instruisto (adreso supre).

Generala Sekretario : S-ro F. THÉBAUD, C.C. Jeunes filles, *Caudry (Nord)*.

Kasisto : S-ro E. BIDOIT, 6, rue de la Paix, *Baugé (M.-et-L.)*.

S.B.E.T. (192 anoj)

Prezidanto : S-ro Cyril LOVE, 11 Church Walk, Penn Fields Wolverhampton.

Sekretario-Kasisto : F-ino Violet C. NIXON (adreso supre).

LANDA SEKCIO HESSEN de « Esperanto-Unuiĝo de Germanaj Instruistoj » (42 anoj)

Sekciestro : Kurt SCHÖNRICH, Hallgarter Str. 10, *Wiesbaden*.

INSTRUISTA SEKCIO ĉe « Slovenia Esperanto-Ligo » (... anoj).

Prezidantino : Sonjo TAVČAR.

Sin turni al Sek. de SLE.L. : Marinko GIVOJE, Poŝtfako 275, *Ljubljana*.

E.U.G.I. (135 anoj) (germana asocio)

Prezidanto, Sekretario kaj Kasisto : S-ro Heino HEITMÜLLER, (23) *Bremen* 8, Waller Heerstrasse 134.

AŭSTRALIA ESPERANTO-SOCIETO DE INSTRUISTOJ.

Prezidantino : D-ro SUMMERS.

Sekretariino : Gertrude POLLARD.

INFORMOJN pri aliaj landaj edukistaj asocioj ni volonte publikigos.

ATENTU

Post Montevideo, ni devas repensi niajn metodojn. Nedubeble ni devas penetri en ĉiujn kulturajn mediojn aŭ pere!

Unu el la rimedoj penetri en tiujn mediojn estas en viaj manoj, karaj legantoj, kaj plie vi mem rikoltos la frukton de via laboro : traduku el la esperantaj gazetoj ĉiujn artikolojn, kiujn vi opinias interesaj por iu gazeto nacilingva... ĝuste elektita.

Tiel vi konigos nian lingvon en larĝaj tavoloj kaj certe vi ricevos nur helpon de koncernaj redakcioj, ĉar vi servos ilin per interesaj artikoloj de alilandaj aŭtoroj.

* *

Traduko kaj Publikigo, en la pedagogia gazetaro, de la artikoloj de I.P.R. estas permesata. Nepre estu indikataj : 1° la aŭtoro (se eble lia loĝloko) 2° la fonto (lasante la titolon en Esperanto kaj jene : « Internacia Pedagogia Revuo », jaro, numero, paĝoj).

Ni petas vin sendi 2 pruvekzemplerojn al la redakcio (ni transsendos unu al la aŭtoro).

ESPERANTO KAJ KULTURO

Internacia Pedagogia Revuo

Redaktejo : D-ro ALBAULT, 11, rue des Feuillants, Toulouse, Francio.

Administrejo (abonoj, ktp.) : E. BIDORT, 6, rue de la Paix, Baugé (M.-et-L.), Francio.

Eldonejo : H. MICARD, Emerita Instruisto, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Francio.

KIMIL

HAVOS DELEGITON en ĈINION

... Havos delegiton en ĉinion

Ni devas danki la Ĉinan Asocion por Kulturaj Rilatoj kun Alilando kiu invitis delegitaron veni en sian landon.

Nia franca Kooperativa Instituto de Moderna Lernejo havos sian delegiton. Sed tiu delegito devas esti kaj estas kooperative helpata de ĉiuj amikoj de nia internacia KIMIL. Tial ni nin turnas hodiaŭ al ĉiuj esperantistoj-edukistoj por ke nia afero estu fruktedona por la eduka temo. Tiel, samtempe, ĝi estos fruktiga ankaŭ favore al Esperanto, ĉar prepara interkorespondado jam ekzistas kun Ĉinoj, kaj eĉ kun Ĉekoslovakoj, kun kiuj almenaŭ parola diskuto estos ebla dum la mallonga halto en Praha. Ni same esperas sukcesi kun sovetaĵ esperantistoj en Moskvo.

Jam franca komitato funkcias por prepari la vojaĝon, kun unu komitatano de la Asocio por Franco-ĉina Amikeco, la respondeculo de la Pariza grupo de la franca K.M.L., kaj la delegito. Tiu komitato studis laborplanon (kiun ja ni povas ŝanĝi laŭ la proponoj de ĉiuj esperantistoj-edukistoj). Ni do deziras ricevi de iu ajn kolego aŭ amiko ĉiujn aldonojn, kritikojn, eblajn. Inverse, ni sendos post la vojaĝo, al ĉiu helpanto, la detalan raporton koncerne la rezultojn de tiu vojaĝo. Jen la laborplano nuna :

I. — EFEKTIVIGOJ

Ni precipe celas reveni kun dokumentoj pri Ĉinio kiuj povus esti uzataj de infanoj aŭ junuloj, aŭ disdonataj al popularaj kluboj, bibliotekoj, kaj asocioj. T. e. :

1) Generalaj dokumentoj pri natura, homa, ekonomia geografio.

2) Tipaj dokumentoj; ekz. : Vivo de la infano en difinita agrikultura regio-

no de Ĉinio, aŭ en granda urbo (Ekz. : « La infano en Peking »).

Laŭ la amplekso, la karaktero, ni eldonus tiujn dokumentojn en dokumentaj kolorilustritaj broŝuroj, koloraj diapozitivaj (uzeblaj en ĉiuj landoj !), aŭ dokumentaj slipoj (kompasoj, pulvo- kaj paperindustrioj...).

3) Tipe ĉinaj kutimoj de la gepatroj en siaj rilatoj kun infanoj : tradiciaj kaj nova sintenoj.

4) Dokumentoj pri ĝenerala tendenco de instruado kaj de instrumentadoj rilate al la socia evoluo de la lando.

II. — KORESPONDADO

Ni devos starigi reton de korespondado inter instruantoj kaj lernantoj.

La instruantoj tiel povus reciproke kompari siajn eduk- kaj instru-teknikojn interŝanĝi laborojn por ekspozicioj, ktp.

Lernantoj povus ankaŭ persone interkorespondi.

Ni ne faris tiun unuan planon laŭ ordo de graveco de ĉiu punkto. Ni laboros plej bone laŭ la ebleco kaj cirkonstancoj. Sed ĵu pli multaj estos la demandoj aŭ proponoj, des pli efikaj estos la aŭtoritato de nia delegito kaj liaj rilatoj kun la ĉinaj respondeculoj aŭ esperantistoj precipe por viziti la elektendajn lokojn.

Ni insistas por ke ĉiuj al mi skribu pri tio siajn dezirojn ne nur por edukado kaj kulturo, sed ankaŭ por ke niaj gravaj efektivejoj pruvu la neegaleblan valoron de Esperanto.

Por la Organiza Komitato,

Roger LALLEMAND,

Fromelennes (Ardennes).

Pierre Bovet

Esperanto, Filatelo kaj Instruado

Prof. Pierre Bovet estas konata kiel direktoro de la Instituto J.-J. Rousseau, kiu i.a. gvidis post peto de I.A.L.A. faman internacian enketon pri la instruado de Esperanto. Pli strikte en la Esperanto Movado, Prof. P. Bovet estas konata kiel Prezidinto de du gravaj Esperanto-kunvenoĵoj, unu en 1922 : « Esperanto en Lernejo », Genevo ; la dua en Prago, 1929 : « Paco per Lernejo ».

Jam antaŭ multaj jaroj, instruante geknabojn, mi klopodis ektrovi rimedon por utiligi la ĝeneralan intereson de infanoj al poŝtmarkoj. Geografio (kie kuŝas tiuj landoj kaj koloniaj ?) kaj nuna historio (okupitaj teritorioj, du Germanioj, k.t.p.) kompreneble riĉiĝas per la konoj akiritaj. La bildoj simbolaj kiuj prezentas la diversajn landojn (Germana Imperio, Franca Respubliko, Svisio armata sidanta sur monto) estas signifoplenaj.

La grandega multo de poŝtmarkoj eldonitaj dum tiuj lastaj jaroj tute maldebilas universalan kolekton. Oni devas elekti temon, « motivon », diras la germanaj filatelistoj ; filatelo iĝas tiel nomata « konstruanta filatelo », aŭ pli simple : instruanta.

Mi mem kolektas nur poŝtmarkojn kun portreto de iu famulo. Mi ne gluas ilin en albumo apud la alia, sed dediĉas al ĉiu slipon. 12 x 6 cm. estas la formato plej uzata ekz. por katalogoj en bibliotekoj. Mi metas la slipojn vertikale en skatolon. Ĉiu slipo komentas la poŝtmarkon laŭ tri vidpunktoj : 1. filatela (lando, jaro, valoro, speciala uzo, ktp.) ; 2. ikonografia (fonto de la portreto, pentristo, desegnisto kaj gravuristo de la poŝtmarko, instituto de presado) ; 3. historia kaj biografia (jaroj de naskiĝo kaj morto de la famulo ; kion li faris ? Kial la lando estas al li dankema ?).

La tuta sliparo tiel iĝas enciklopedio de la plej famaj homoj el la tuta homaro. Mi dividis ĝin formante du seriojn. La unua kunprenas la grandajn nomojn de la kultura historio : ekkonado de la Tero (de Marco Polo al Nansen kaj Charcot), venkado de la aero (Leonardo da Vinci, Montgolfier, Mermoz), Eklezia Historio (S. Paŭlo, Luther, Pio XII), Pedagogio (Komenius, S. Jean de la Salle, Pestalozzi), Bonfarado (Vincent de Paul, Henri Dunant, Zamenhof), Literaturo (poetoj, verkistoj), Filozofio, Juro, Ekonomio, Sciencoj, Artoj (muzikistoj, pentristoj, ktp.), Inventistoj (Gutenberg, Edison). Mi ankaŭ aldonis al tiu ĉi serio la eminentulojn kiuj faris la historion de la poŝto (Thurn kaj Taxis, Rowland Hill, Arago).

La dua serio entenas grandajn nomojn de la politika kaj milita historio ; reĝojn, ŝtatestojn, revoluciistojn. Tamen mi ne konsideras kiel « grandajn », la nunajn

estrantojn de iu lando : en Usono, ekzemple, la poŝtmarkoj ne donas la portreton de la aktuala prezidanto sed nur de malnovaj (Washington, Lincoln, Wilson, Roosevelt).

Oni facile vidas ke en tia kolekto la kunmetado de poŝtmarkoj kun portretoj estas la plej malgranda parto de la afero. Ektravi la necesajn informojn por redakti la tekston de la sliparo ne estas tiel simpla. Jen la helpo kiun mi trovis en Esperanto kaj la esperantistaro. Ne ĉiuj homoj famaj en sia lando estas sufiĉe konataj por ke oni trovu ilian nomon en verkoj, kiel « Le Grand Larousse » aŭ la « British Cyclopaedia ». Pensu pri la liberigintoj de Sudamerikaj respublikoj, pri la Balkanaj patriotoj. Estas necese trovi en la landoj mem personojn, kiuj povu konatigi vin kun tiaj naciaj herooj. Mi kompreneble uzas multajn amikojn kaj eks-studentojn en diversaj kontinentoj. Sed mi trovis en la esperantistaro tre afablajn kompetentajn helpojn. La Jarlibro de UEA mencias en multaj landoj fakdelegitojn kiuj interesiĝas pri Filatelo. Kuraĝe mi skribis al ili uzante la konatajn malgrandajn membromarkfoliojn. De ĉie, Hispanio, Jugoslavio, Portugalio, Suomio, eĉ de Aŭstralio, mi ricevis tre valorajn informojn kun afablaj proponoj daŭrigi la kunlaboradon.

Tiumaniere denove Esperanto helpis instruadon. Dankon al Esperanto.

GEOGRAFIA REVUO

De nia kunlaboranto Robert GERARD, 45, rue de Vouillé, Paris, 15^e, kiu aliparte faras taŭgan informlaboron en la Instruistaj seminarioj, ni ricevis tre interesajn informojn pri la Internacia Geografia Asocio, kiu preparus esperantan landkartaron. Aliparte ĝi jam estus eldoninta la 1-an n-on de Geografia Revuo ». Abono : 1 us. dol. al S-ino Chiari DRAGONI, Via Gian Francisco Re II, Torino (Italio). S-ano R. GERARD, proponas sin por pliaj informoj.

AUSTRALIO

Ni ricevis el Aŭstralio la roneotipitan organon de la « Aŭstralia Esperanto-Societo de Instruistoj » eldonata sub la nomo : « Klerigo ». Bedaŭrinde neniu adreso menciita.

B-de H. Groendijk.

La leginstruado en la unua klaso de la elementa lernejo en Nederlando

Antaŭ kelke da tempo mi legis en Usona revue *Colliers Weekly* artikolon kun la iomete drameca titolo: « Kial oni ne sukcese instruas legi al mia infano? ». En la artikolo oni forte atakis novajn tendencojn en la leginstruado en Usono, kiu moderneco laŭ la verkinto re donis sufiĉe da rezultoj. Eĉ post multjara lernado multe da infanoj ne kapablis rekonii simplajn vortojn kaj eĉ en la mezgrada lernejo oni ofte devas reinstrui gernerantojn en la legarto.

Tion ĉi leginte mi komencis pripensi la nuntempan leginstruadon en Nederlando. Laŭ kiuj principoj kaj metodoj oni instruis kaj instruas legi al infanoj en la elementa lernejo?

Trale gente la nederlandan literaturon pri ĉi temo kaj ankaŭ laŭ propraj spertoj kun la praktiko oni povas konstati ke ekzistas du tendencoj (skoloj): la laŭ-principe analiza normvort-metodo kaj aliflanke la bloka metodo. (*)

Internacia elŝango en nia organo de spertoj sur la kampo de metodiko kaj didaktiko ŝajnas al mi unu el la ĉefaj taskoj de nia organo kaj pro tio mi ĉi tie petas vian atenton por konciza priskribo de nederlandaj metodoj.

Mi unue rakontu ion pri tipe nederlanda normvorta metodo, laŭ la kreinto nomita la HOOGEVEEN-metodo. Miloj kaj miloj da infanoj lernis sukcese legi laŭ tiu ĉi metodo. Facile oni retrovas en ĝi la principojn de la elementa psikologio, kontraŭa al la moderna blok-psikologio. En la element-psikologio la « bildoj » ebligas surbaze de la elementoj, la vortoj, el kiuj tiuj-ĉi bildoj formiĝas. La elementoj estas fundamentaj, poste el ili kreiĝas pere de procedo de asocio la tutecoj (blokoj), la kompleksbildoj. Forta apoganto de tiu ĉi psikologio estis la germano HERBART (1776-1841), kiu forte influis la pedagogion en Nederlando en la 19a jarcento. Kiam oni senrezerve aplikus tiun ĉi principon al leginstruado, oni do unue instruas la literojn, poste la kunmetaĵojn kaj plej poste la tutaj vortojn. Efektive ekzistis en la 19a jarcento tiaj metodoj. La rezultoj tamen malpravigis ilin.

Cefa trajto de la HOOGEVEEN-metodo estas la uzo de 17 normvortoj, t.e. vortoj kies analizo aŭdigas la literojn laŭ la fonetika sono. La normvortoj ankaŭ jam troviĝas en rakonto, kiun la instruistino rakontas samtempe. La gelnantoj ekzercas sin uzante legotabuleton, sur kiu tro-

vigaŭ la bildoj ĉe la normvortoj, ekz. bildoj de simio, nukso k.t.p. La gelnantoj havas du skatoletojn enhavantajn kvanton da literoj, presitaj sur malgrandaj pecoj el kartono. Ili nun ekzercas analizon kaj sintezon de vortoj manipulante la literojn. Antaŭe la infanoj jam estas instruataj aŭdi la apartajn sonojn. Rekono de la sono en la presita vorto estas instruata unue ĉe la finliteroj, kiuj plej facile povas esti apartigitaj. Ekzemple ili aŭdas ke la finlitero de « mes » (franciĉlo) estas sama kiel en « zus » (fratino). Tiam ili demetas la s-on sub la tabuleto. Kio nun restas? Remetu la s-on k.t.p. Poste oni instruas la aliajn literojn laŭ sinsekvo de kreskanta malfacileco rekonii ilin. La k-o, t-o kaj la p-o ekz. estas malfacile disigeblaj komence de vorto. Kompreneble oni devas, almenaŭ en la komenco, uzi nur vortojn kun laŭfonetika ortografio. La nederlanda ortografio estas pli malpli laŭfonetika, almenaŭ multe pli ol la angla kaj la franca, kaj tio ebligas al la infanoj, post la analizo de la normvortoj kaj post iom pli da ekzerco, mem komposti sufiĉe da novaj vortoj pere de la lernitaj literoj.

Car HOOGEVEEN do komencas per blokoj (tutaĵoj), vortoj, lia metodo do ne estas severe aplikita laŭ la element-psikologio. Oni tamen povas facile trovi ties principojn en ĝi. Elstaraj trajtoj estas:

La infanoj lernas pli malpli rapide mem analizi la vortojn sur fonetika bazo. Diserigo de la malfacilaĵoj, klarigo konscia koncepto de la materialo. Kvankam efektive tiu ĉi metodo teknike estas pli malpli perfekta, oni tamen en certaj instrumedioj serĉis alian metodon. Flanke de okulfrapaj avantaĝoj oni povis ankaŭ konstati malavantaĝojn.

Laŭ la moderna psikologio la lerna procedo ne erigiĝas en izolitajn fakojn, sed ekzistas nur unu tuteco: la infano kiu estu edukata. Antaŭ la instruado venu la edukado. Edukante kaj en tio do ankaŭ instruante la infanon, ni do ne altrudu al infano nian pensmanieron de plenkreskuloj, sed ni komencu pristudi kiel la infano agas kaj pensas. Tiel oni eltrovis ke la infano ne unue perceptas erojn, elementojn, sed male nediserigitajn blokojn (tutaĵojn) kompleksbildojn (germanlingve: Gestalt-Sing).

Estas la ideoj de la belga Ovide DECROLY (1871-1932), kiuj forte influis la modernan nederlandan didaktikon pri leginstruado. Ili vekis vivan intereson pri

la t.n. « bloka » metodo (*) (1) metodo kiu baziĝas sur la Gestalt-psikologio, kaj la psikologio de la infana evoluo.

Por veki intereson de infano oni prenu, kiel elirpunkton, situacion kiun la infano aktive kaj emocie travivis. Legado ne estas praktiko memstara, pure izolita, sed ĝi estas lingvopraktiko kaj lingvo ĉiam estas respeguligo de la vivo. Tio signifas ke principe oni neniam povas uzi aron de normaligitaj vortoj. Male, oni devas unue eltrovi kio interesas ĝuste en tiu momento la infanojn. La konversado, unu el la ĉefaj lingvopraktikadoj, iĝas grava elemento en la instruado : Joĉjo rakontas emocie ke liaj gepatroj ricevis kateĉon. Kaj la instruanto instigas lin rakonti al siaj kunuloj pri la kateĉo. La tuta klaso interesigas kaj tiam la momento venas kiam la instruisto diras : Kaj nun ni skribu tion sur la tabulo.

Li prenas la kateĉon kaj jen la miraklo : La kateĉo de Joĉjo estas nigra.

Ankoraŭ ne eblas por la infanoj distingi erojn el tiu ĉi frazo, sed la tutaj estas emocie travivita, ĝi estas vera vivanta lingvaĵo kaj ne iu abstrakta frazo.

En tia maniero la legolernado ne estas okupado kiu ekzistas flanke de la vivevoluo de la infano, sed ĝi estas laŭnatura evoluo. Plejble oni bezonas forigi abstraktaĵojn kaj iĝi kiom eble plej konkreta. Nur la vivanta nuneco vivas por la infano.

Mi nun rakontos ion el la spertoj de la nederlanda instruisto N. C. DE BOER publikigitaj en « Globaal Lezen », Groningen 1950.

Promenado kun la infanoj jam povas liveri trezoron da spertoj. La intereso de 6-jaruloj treege alternas. Pro tio oni bezonas kapti la atenton laŭmomente. Ek de la unua semajno, kelkfoje eĉ ek de la unua tago, kiam la infano vizitas la lernejon, oni kune preparolas spertojn kaj esprimas tiujn desegne kaj lingve. Ĉiam la teksto estas redaktata de la infanoj mem. Tiel oni akiras tekstojn kiujn la infanoj emocie kaj intelekto komprenas.

Kelkaj citaĵoj el la taglibro de la instruisto :

La infanoj faras la frazon : Sinjoro DE BOER estas en la klasoĉambro.

La infanoj ankaŭ estas en la klasoĉambro.

La nukso de Roberto.

Krak diras la nukso.

Oni parolas, desegnas kaj skribas tion. La instruisto faras legokartojn.

Poste li faras apartajn vortojn. La tekstoj estas buŝe ripetataj.

Tiaj malgrandaj interesocentroj (DE-CROLY : Petits centres) kreiĝas ĉiam denove, ĉiusemajne kelke da.

Ankaŭ dum la tria semajno la infanoj parolas, desegnas kaj skribas. Tiam oni povas konstati ĉe kelke da infanoj komenciĝantan diserigon de kompleksoj.

Tiu diserigo ankoraŭ evoluas nekonscie. (La konscia analizo de vortkompleksoj troviĝas en pli posta fazo). La gelernantoj komencas vidi la vortojn kun ties skribita formo.

Dum la kvina semajno la diserigo evoluas kun laŭ-individue malsimila rapideco. (Tiu pli individua evoluo estas ankaŭ eco de tiu ĉi metodo, kontraŭanta la pli element-psikologian metodon de HOOGEVEEN, kiu pli direktas la analizon senrigarde al individuaj diversecoj). Alproksimiĝas la tempo por uzi la apartajn vortkartetojn. Tiuj ĉi estas benoj el kartono, sur kiuj troviĝas la samaj tekstoj kiaj ankaŭ troviĝas sur la legokartoj kaj la lotludoj. Tiuj ĉi benoj estas tranĉataj ĝis unuopaj vortoj. La infanoj povas meti ilin en ujoj, ligitaj dorsflanke sur la legokartoj. La infanoj nun ekzerkas sin metante la vortojn en la ĝustsinsekvon, komence kun la helpo de teksto sur la legokarto, poste ankaŭ sen ekzemplo.

Oni tiam eĉ povas komenci la ekzercojn kunmetante tekstojn. Tiel oni serĉis la tekston :

La ŝipo estas de Roberto.

1 1 2 3 4

Ĉe la kunmetado diversaj infanoj helpis la instruiston.

1 : Jam troviĝis sur la tabulo kiel surskribo de la leciono.

2 : Jam multe da infanoj konis ĝin parkere.

3 : Ili trovis « de » sur legokarto : La poto kun floroj de sinjoro De Boer.

4 : Trovita sur legokarto : La nukso de Roberto. Krome la nomoj de ĉiu opa infano troviĝas sur nomkartoj kaj sur la kajeroj.

En la 9-a semajno oni povas konstati komencon de la diserigo en silbojn. Oni daŭrigas la ekzercojn kun la legokartoj uzante la vortostriojn. Kaj oni nun ankaŭ legas frazojn kompositajn el vortoj el la vorttrezoro de la legokartoj. Nova sintezo el frazoj pere de jam konitaj vortoj.

En la 11-a semajno evidentigis subite la ebleco rekoni unuopajn literojn. Komenciĝis ĉe la s-o : « Nun ni tion atentigas. Kiam io estas la sama ni ĉiam klopodas trovi kiu litero ĝi estas. Pere de la fin- kaj komenc-konsonantoj kaj vokaloj ni ĉiam pli enpenetras la strukturon de la vortoj ». La kvanto de rekoncblaj literoj kreskas potage. Dume oni ankaŭ uzas la fonetikon, ekz. distingante s kaj z, v kaj f, m kaj n. En la sekvantaj semajnoj tiu procedo plue evoluas. La progresoj estas tre malsimilaj. Pro tio la malpli progresintaj ricevas opajn vicojn.

Mi iom pli detale raportis tiujn ĉi spertojn por demonstri la specialan karakteron de la bloka metodo. Klare evi-

(fino sur p. 6)

Marjorie Boulton

LITERATURO EN LA LERNEJO

Kial ni instruas geknabojn pri literaturo? Ĉu por ke ili mem iĝu verkistoj? — Certe ne; verkistoj edukas sin mem, jes, eĉ spite la lernejojn! Ĉu por ke ili iĝu profesiaj kritikistoj aŭ prelegistoj pri literaturo? Ne; tiaj specialistoj devos havi specialajn talentojn, kaj trasantudi longan specialistan edukadon post la lernejo.

Ĉu ĉar literaturo estas parto de la nacia heredaĵo? — Bedaŭrinde oni povas instrui pri literaturo ŝovinisme, sed esperantisto nepre konsentos, ke tio estas netaŭga sinteno. (Mi mem antaŭ ne longe anstataŭigis kurson pri angla literaturo per kurso pri mondliteraturo: tio estas tute praktika, se permesita). Ĉu ĉar oni devas iel okupi la geknabojn, kaj literaturo estas en la lerneja horaro? — Nu, mi ja ricevis, kaj poste observis, multajn lecionojn ne pli celemajn!

Sed kial la normala, nespecialista homo legas? se li legas... se edukado ne sufokis lian legemon?

Pro informo pri sia fako, aŭ plezuro dum liberaj horoj. Eble pro snobaj motivoj; sed tiujn ni ne havas devon atenti; literaturaj snoboj estas ofte malpli saĝaj ol pensemaj analfabetoj!

La celo de bona edukisto pri literaturo estas duopa: li volas ke la geknaboj alkiutimiĝu al la inteligenta serĉado de informoj en libroj; li volas, ke ili ekŝatu bonan literaturon, por ke poste ilia liberhora legado larĝiĝu kaj nutru la menson, anstataŭ stultigi ĝin, kiel faras multaj ĵurnaloj, gazetoj kaj komercaj romanoj.

La serĉado de informoj estas tekniko, tre facile instruenda; la ĉefa malhelpo al tia instruado estas ke instruisto, kun tro granda klaso, nesufiĉaj bonaj libroj kaj rigida horaro, ĉiam sentas la tenton tuj disdoni informojn, nutri la ĵunan menson per kulero anstataŭ doni manĝaĵojn kaj kuirilojn. Jen esence teknika-materiala problemo, teknike-materiale solvebla.

Edukado al bongusto, bona legapetito, sana scivolemo kaj stiloĝuo, estas multe pli komplika problemo. Ni devas ankoraŭ multe pripensi ĝin; ni ankoraŭ ne scias kiel instrui pri literaturo. Mi nur proponas kelkajn pripensindajn demandojn, sen kredi ke mi povas doni plenajn respondojn.

Ĉu la tre multaj ekzercoj kiun oni kutime faras pri literaturaĵoj eble pli detruas ol stimulas intereson pro bonaj libroj? — Ĉu ni ĉiam certas, ke ni vere ordonas ekzercon por klarigi ion pri la verko kaj ne nur por pleniĝi la tempojn? Parafrazoj, eble, eĉ rekte malbon-

faras al la gelernantoj, ĉar la ekzerco sugestas al ili la malverajon, ke iu ajn povas alivortigi la bone elektitajn vortojn de majstra verkisto, kaj gardi la saman signifon. (Iu brita instruisto proponis la ekzercon de « inversa parafrazo »; li parafrazas bone esprimitajn tekstopartojn, kaj la gelernantoj devas serĉi la lokon, kie la aŭtoro diras tion multe pli trafe. Jen eble valora ideo).

Ĉu ni eble inklinas studi librojn multe tro detale? Oni kutime legas romanon, pro plezuro, dum kelkaj horoj; dramo de ekz. SEKSPIRO daŭras eble du horojn en la teatro. Kiam ni uzas la saman priskribitan libron dum tuta trimestro, aŭ eĉ dum tuta jaro, ĉu ni ne kvazaŭ malrealigas la legosituacion? Oni povas eĉ malŝatigi bonajn librojn, se oni kredigas al gelernantoj ke ili devas tede labori super bonaj libroj sed legas senvalorajn librojn rapide pro plezuro. Ĉu eble ni malrapidigas la legadon anstataŭ kuraĝigi tiun rapidan legadon kiu estas grava faktoro en la alkiutimiĝo al porplezura legado?

Ĉu eble ni estas tro timemaj pri la elekto de verkoj por la ĝejunuloj? Oni ofte, ekzemple, zorge elektas libron pro la manko de seksa temo; sed seksaj temoj urĝe interesas geadoleskulojn (*), kaj kutime ili akiras seksan sintenon aŭ el bona literaturo, aŭ per maldecaj flustrajoj, intersanĝoj de superstiĉoj kaj gepatraj mensogoj. Sintenon ili ja akiras; kaj mi preferas la fortajn pasiojn de SHAKESPEARE, RACINE aŭ GOETHE ol komercaj stimuliloj kaj vivneaj, falspudoraj mensogoj. Simile oni inklinas eviti priargumentindajn temojn kiuj rilatas al la nuntempa vivo, kritikojn de la socio, ktp. Ĝejunuloj ofte estas serioze pensemaj, se la edukistoj ne detruas ilian naturan scivolemon kaj argumentemon!

Ekzamenoj povas estigi fetiĉojn kiuj tute ne rilatas al normala legado kaj eĉ detruas la inklilon legi; almenaŭ en Britujo hodiaŭ alia fetiĉo nun ekzistas: la stranga virto de rikana kritikemo. Tio estas eble la rezulto de kritikista skolo en Cambridge: ĝi faris altvaloran kritikan kaj semantikan laboron mem, sed ekstroigis, kaj kreis multajn troigemajn disĉiplojn, ĝis rikanemo kaj groteske troiĝita elektemo iĝis modo en Britujo kaj oni apenaŭ kuraĝas ŝati verkon. — La fakto, ke tiu grupo estas iom ligita al « Basic English », (Baza Angla) kaj moke forĵetas Esperanton, eble havas signifon psikologie interesan.

Nun oni preskaŭ penas instrui elektemon antaŭ ol oni firme starigis la kutimon legi; tio ŝajnas al mi eraro. Literaturo eble ofrigote rilatas

turkritikado devus esti la lasta stadio en la ĝuo de literaturo. Kaj ĉu ni vere volas krei tiajn diabetecajn apetitojn, kiuj forĵetas multan bonan animan nutron pro tro altaj kriterioj, ofte la kriterioj de sensangaj pedantoj; ĉu ni vere volas kuraĝigi la sintenon, de homo kiu, ne kapablante mem verki eĉ unu potencon novelon, kredas ke li rajtas rikane moki kaj ekzili romaniston kiel DICKENS, poeton kiel TENNYSON? Laŭ mia opinio, rikanemo beligas nek la homan vizaĝon, nek la homan psikon.

En la altgrada literatura edukado, ĉu ni eble emas legigi tro da prilibrigaj libroj kaj ne sufiĉe legigi la originalajn artverkojn? ĉu tiu ĉi procedo ne povas malfortigi la juĝokapablon kaj falsigi la tutan sintenon al literaturo? Eĉ tre junaj lernantoj ofte skribas kvazaŭ ili estus pli saĝaj ol la studitaj verkistoj; ĉu, estigante tian sintenon, ni servas aŭ la veron aŭ la arton?

Mi suspektas, sed ne rajtas firme diagnozi, du faktorojn en literatura edukado kiuj estas esence kontraŭ-literaturaj.

Unue, multaj konsciaj aŭ senkonsciaj reakciuloj en edukado preskaŭ deziras ke edukado estu teda afero; kaj kiam oni liberigis de la grekolatina sistemo kaj ekuzis la nacian lingvon, tiaj homoj komencis kvazaŭ mortigi la nacilingvajn verkojn.

Due, pro la sinteno de la socio, geinstruistoj preskaŭ devas, en multaj landoj, resti vivtimumaj, konvenciaj, tre limigitaj. Ili devas studigi la verkojn de grandaj kreintoj, de potencaj artistoj; kaj la ĝenerala tendenco de granda arto, se ni rigardas ĝin rekte, estas plej ofte vivjesa kaj liberiga. Tial, oni ofte respektas grandan arton per la lango; sed la filistrita koro daŭrigas maledukadon.

Mi proponas nur demandojn, hipotezojn, dilemojn; nia nescio pri la problemo estas abisma; sed mi volas pensigi.

GLOSO

Adoleska : vir(in)iganta. Vidu I.P.R., 1956 : gloson p. 105.

La leĝinstruado en la unua klaso de la elementa lernejo en Nederlando

(fino de p. 4)

dentigas ke ĝi pli multe baziĝas sur la trovitaĵoj de la novaj psikologioj.

Kvankam la « bloka » metodo akiris certan reputacion en Nederlando, speciale en pli progresintaj instrumedioj, kaj ankaŭ efektive konsideranda nombro da lernejoj ekuzis ĝin, oni tamen ne povas nei ke hodiaŭtage la unua entuziasmo forigis. La « rezultoj » ne ĉiam estis kontentigaj. Uzo de la metodo devigas la instruiston ĉiam denove al propraj iniciatoj. Ĉe analizo kaj sintezo de la elementoj evidentiĝas grandaj diferencoj inter la opaj gelernantoj. Ofte post unu monato ne plu ekzistas klaskomuneco, kio erarigas la mezan instruiston ĉe la sekvota metodo.

Ofta eraro ankaŭ estas tro longa prokrasto de la analizo. Generale oni povas diri ke la unuaklasa lernanto atingis la stadion de analizo. Legante la menciitan artikolon el *Colliers Weekly* oni ricevas la impreson ke en tiaj okazoj la analizo estas prakrastita tro longe. En tiaj okazoj la lernanto povas nur legi la iam antaŭe en ilia tuteco lernitajn vortojn. Li preskaŭ ne kapablas mem rekonni antaŭe ne konitajn vortojn. Estas kompreneble ke krom maltaŭga metodiko ankaŭ malfacila ortografio de iu

lingvo povas kaŭzi tian mankon de legokapablo. Vortoj ne laŭfonetike skribitaj povas malfacile esti rekonataj kaj nur parte estas analizeblaj.

Antaŭnelonga tendenco en la nederlanda legodidaktiko estas sistemo de lernado kun elementoj pruntitaj el la malnova HOOGEVEEN-metodo kaj el la nova bloka metodo. Por plirapidigi la diserigon de la vortoj en literojn oni ofte aplikas la legotabulon de HOOGEVEEN.

Resume, oni povas diri ke la bloka metodo plu profunde radikiĝas en la infanan vivon, ĝi pli konfojmiĝas al la pli perokula ol perorela perceptado de infanoj, kaj ĝi ne izolas la legadon el la komplekso de la lingvopraktikado: paroli kaj aŭdi, skribi kaj legi, rakonti kaj travivi la rakontitan. Aliaflanke grandaj malfacilaĵoj kreiĝas kiam la instruisto ne sukcesas gvidi ĉiujn deviaĵojn de la infana atento.

GLOSO

Bloka metodo. — Esplicite : metodo pri « bloka legado », t.e. legado laŭ « blokoj » : tutaj frazoj, ktp...

France : méthode globale (méthode de lecture globale).


Atanas D. Atanasov — Ada

LERNU KAJ INSTRUU



La Prepozicioj en Esperanto

Tria Leciono



AL — Mi venas al vi. Mi donas al ŝi. Li parolas al ili. Ili deziras al vi bonan tagon. Tio plaĉas al mi. Al mi ŝajnas, ke tio estas facila. Li estas egala al vi. Al mi oni ŝtelis la horloĝon (oni ŝtelis mian horloĝon). Al mi doloras dento. La birdo flugis al (kontraŭ) la fenestro. Akcepto al fremdlanda gasto. Dank' al lia helpo ni povis veni.

ANSTATAŬ — Mi venos anstataŭ vi. Li vizitis ŝin anstataŭ (viziti) ŝian fratinnon. Ne servas larmo anstataŭ armo.

ANTAŬ — *Loko* : Li staras antaŭ la domo. Si deklaris antaŭ ĉiuj sian pretecon labori. *Tempo* : Ni alveturis antaŭ du tagoj. Ili estis ĉe la stacidomo antaŭ la sesa horo. Ne laŭdu la tagon antaŭ la vespero.

APUD — Kiu sidis apud vi en la teatro? Apud la tablo. Apud la fenestro. Apud plena manĝotablo ĉiu estas tre afabla.

CE — Si loĝas ĉe siaj gepatroj. Ĉe ni estas gaje. ĉe la tablo. ĉe la antikvaj popoloj estis kutimo danci. Ĉe tiuj vortoj ŝi ekridis. Profesoro ĉe la universi-

tato. Restu la tajloro ĉe sia laboro. Ĉe la forveturo li esprimis varman dankon. Ĉe tro ĝentila ekstero ofte mankas sincero.

CIRKAŬ — Ĉirkaŭ la domo estas ĝardeno. Ĉirkaŭ la mondo. La luno rondiras ĉirkaŭ la tero. Venos ĉirkaŭ (proksimume) kvindek personoj. Mi venos ĉirkaŭ (proksimume je) la kvina horo.

DA — Kilogramo da pomoj. Glaso da vino. Multe da libroj. Dekoj da esperantistoj. Kiom da mono? Post iom da tempo.

DE — *Elira punkto* (foriĝo, depreno) : Mi venas de via frato. Ili benas de (el) Parizo. Mi prenis la libron de la tablo. Prenu de li la kotizon. Prenu de lia kapo la ĉapelon. De mia frato li ricevis belan donacon. De mateno ĝis vespero. De tempo al tempo. *Aparteneco* (parto, aŭtoreco) : Tio estas la jako de mia patro. Donu al mi la krajonon de via amiko. Kia estas la nomo de via najbaro? Titolo de verko. Tegmento de domo. Peco de viando. La duono de la greno apartenas al lia filo. Ĉu vi ŝatas legi la poezion de Victor Hugo? La dramoj de Shakespeare (legu : Sekspir); *Aganto* : La horloĝo de Petro donacita de (fare de) lia patro. La kostumo aĉetita de (fare de) mi de la magazeno de nia najbaro. La libro estas tradukita de mia filino.

(*Atentu la kazojn, kiam estas necese uzi fare de : La laboristo atendas plialtigon de la salajro fare de la mastro. Ofte tio ne estas necesa, ĉar la senco de la frazo estas klara ankaŭ uze nur de la prepozicio de : La romanoj de Dickens estas legataj de multaj.*)

DUM — Dum (en la daŭro de) la tago. Dum (en) dormo. Dum dek tagoj (en daŭro de dek tagoj). Dum la leciono. Dum (ĉe) la legado. La apetito venas dum la manĝado (en la tempo de la manĝado, en la daŭro de la manĝado, paralele al, kun ĉe la manĝado).

EKSTER — Ekster la ĉambro. Ekster la urbo. Ekster la lando. Ekster nia rondo. Tio estas ekster (super) mia povo (ekster mia eblo).

EL — Mi venas el la ĝardeno. Li venas el la vilaĝo. La pluvo falas el la nuboj. El la aero. Li tiras sian tukon el la poŝo. Traduko el la franca lingvo. Kio sekvas el tio? El tio ni povas konkludi, ke... Li kantas el tuta (plena) gorĝo. Ringo el oro. Plej alta el (inter) ĉiuj. Ne gutas mielo el la ĉielo.

EN — En la lernejo. En nia lando. En mia korpo. En la aero. En liaj paroloj estas saĝo. En (dum) 1957 jaro. En la tago de la festo. En daŭro de tri horoj. En (dum) dormo. En sonĝo. En embaraso. En bona humoro. En granda nombro. Romano en tri partoj. Dramo en kvin aktoj. En konversacio kun ti. En konsento kun ĉiuj. Lando dividita en (je) tri regionoj.

GIS — Ni marŝos ĝis la vilaĝo. Li veturis de Sofio ĝis Tuluzo. De mateno ĝis vespero. Nur du semajnoj restas ĝis la kongreso. Atendu ĝis dimanĉo. Gis revido. Gis kiam vi silentos? De majesta ĝis ridinda estas nur unu paŝo.

INTER — Inter la urbo kaj la vilaĝo. Li marŝas inter (meze de) ni ambaŭ. Inter du kolonoj. Inter kvar muroj. Inter vivo kaj morto. Elektu inter devo kaj intereso. Inter (en la medio de) la esperantistoj li rapide lernis paroli la internacian lingvon. Inter amikoj tiaj ŝercoj estas permesataj. Inter (el) ni ĉiuj li estas la plej inteligenta. Inter kvar okuloj. Inter lupoj krii lupe.

JE — Je la kvina horo. Kaptu lin je la kolo. Si kondukas la infanon je la mano. Malproksima je dek kilometroj (malproksima dek kilometrojn). Plena je (de) ŝtonoj. Riĉa je brutoj. Kontenta je (pri) la festo. Si ludas je piano (ŝi ludas pianon).

KONTRAŬ — Li kuras kontraŭ la arbaro. Kontraŭ mi venas homo. Li staras kontraŭ la muro. Ili marŝas kontraŭ la vento. Ili parolas kontraŭ li. Ni estas kontraŭ la milito. Interŝanĝi varon kontraŭ varo. Li donis ŝafon kontraŭ (interŝanĝe je) porko. Kontraŭ mil frankoj vi povos ricevi la sekvantajn librojn... Ni povas liveri al vi tion kontraŭ (por) kvin dolaroj. Rimedo kontraŭ malsano. Gardu vin kontraŭ viaj malamikoj.

KROM — Krom li, venis ankaŭ lia fratino. Li ne parolas alian fremdan lingvon krom Esperanto. Krom mi, neniu en nia hejmo parolas esperante.

KUN — Si marŝis kun (akompanate de) sia onklino. Mi sidis kun li en la ĉambro. Ĉu vi parolis kun ili? Mi iris kun fosilo. Mi prenos (kondukos) kun vortojn kun rido. Li aŭskultas kun atento. Estu ĝentila (afabla) kun ŝi Ĉiu sezono kun sia bono.

LAŬ — Li marŝas laŭ (paralele al, paralele je) la fluo de la rivero. Iru laŭ tiu vojo. Agu laŭ la leĝoj. Mi agis laŭ mia konscienco. Faru tion laŭ la ekzemplo de la ceteraj. Mi venis laŭ lia ordono. Ĉiu laboras laŭ sia povo. Lau mia opinio. Laŭ mia scio. Tio ne estas laŭ mia gusto.

MALGRAŬ — Malgraŭ (malkonsidere al) la malbona vetero mi venos. Li faris tion malgraŭ mia volo. Malgraŭ ĉiuj malhelpoj kaj baroj. Malgraŭ (spite al) la ĝenerala opinio.

PER — Mi fosas per fosilo. Per kio li laboras? Per kio ŝi vivas? Mi skribas per kraĵono. Li venis per tramo. Ni sciigos tion al vi per letero. Li pagas per ĉeko. Kovri la glason per papero. Ŝtopu la botelon per korka ŝtopilo. Li ludas per vortoj. Li tenas la pafilon per (en)mano. Per unu mano il kaptis lian manikon, per la aliaj li komencis frapi lin. Li prenis mian monon per forto (uze de forto, perforte). Per (de) kiu estos reprezentata via societo en la kongreso?

POR — Por kio (kiacele) vi venas? Por kiu vi venas? Ĉu por mi vi venas? Por kiu vi skribas tiun leteron? Mi portas por vi pomojn. Tio estas destinita por mi. Por skribado ni bezonas paperon. Ludo por plezuro. Tempo por tagmanĝo. Tempo por rikolto. Mi pagas abonon por mi kaj por mia amiko. Por mi tio estis surprizo. Por li tio estas bagatela. Tion mi bezonas por la vintro. Por ĉiu tago li havas apartan kravaton. Kiom mi devas pagi por tio? Ni estas por la paco inter la nacioj. Unuj voĉdonis por la propono, aliaj kontraŭ ĝi. Kiu estas estas por kaj kiu kontraŭ? Mi prenos la libron nur por unu semajno. Ĝi povas resti ĉe vi por ĉiam. Por la mono pastra preĝo, por la mono romp' de leĝo.

POST — *Loko*: Li marŝas post (malantaŭ) mi. Post la domo estas granda ĝardeno. Post la arbaro estas rivero. *Tempo*: Post tri jaroj. Mi forlasis la kunvenon baldaŭ post li. Post la prelego okazis viglaj diskutoj. Iom post iom. Paŝo post paŝo. Post sufero venas prospero.

PRETER — Kiu pasas preter nia domo? Traflugis anĝelo preter la orelo.

PRI — Ni parolas pri la kongreso. Pri kio vi pensas? Pri kiu rilatas viaj vortoj? Deklaracio pri la esperantismo. Rakonto pri feinaj. Kantoj pri Rolando. Pri la lupo rakonto kaj la lupo renkonte.

PRO — Pro (kaŭze de) la pluvo mi ne povis veni. Pro (pri) kio vi koleras? (kio estas la kaŭzo aŭ kio estas la objekto de via kolero?). Pro kio vi malfruiĝis? Pro kio vi estas ĉagrena? Pro guto post guto disfalas granito. Mi dankas pro via servo. Mi dankas pro la senditaj floroj.

SEN — Li estas sen jako. Mi restis sen mono. Kial vi venas sen ŝi? Mi pasigis la nokton sen dormo. Li parolis tiujn vortojn sen entuziasmo. Sen ĝojo. Mi diris tion sen intenco ofendi kiun ajn. Ne venas honoro sen laboro. Pli bone (prefere) seka pano sen butero ol dolĉa kuko sen libero. Nuda kaj kruda, sen groŝo en poŝo.

SUB — La kato sidas sub la tablo. Sub la brako li portas ian objekton. Si marŝis sub pluvo. Paŝtisto sidas sur la arbo. Sub (en) la ombro de la arbo. Sub la ŝarĝo de la peza sako, Sub la ŝarĝo de la jaroj. Mi estas sub liaj ordonoj. Ĉu vi servis sub li (sub lia estreco)? Sub (en) tiuj vortoj kaŝas sin alia penso. Popolo sub jugo. Li deziras aperi sub (en, kun) formo de bonfaranto. Sub seruro promesojn tenu, sed doninte ne reprenu.

SUPER — La birdo flugas alte super la tero. Super niaj kapoj. Li laboras klinite super la libro. Tri jarojn mi laboris super tiu verko. Tio estas super miaj fortoj. Super (krom, ekster) ĉio li estas ankaŭ bona kantanto.

SUR — Sur la planko estas tapiŝo. Li ne portas ĉapelon sur sia kapo. Ili promenas sur la strato. Sur (en) kiu strato vi loĝas? Sur (en) kiu strato estas la poŝtejo? Sur ŝiaj lipoj venis rideto. Sur (en) la horizonto aperas homaj siluetoj. Sur (ĉe, je) ĉiu paŝo vi renkontas samideanojn.

TRA — Li pasis tra la kampo. Si rapidas tra la strato. Tra la aero. Tra la mondo iras forta voko. Li rigardas tra la fenestro. Kial vi ne eniris tra la pordo? Miaj okuloj rapide kuris tra la teksto. Tra la granda bruo mi aŭdis sian voĉon. Rido tra larmoj. Tra liaj vortoj oni povas kompreni ian intiman intencon. Tra (dum)la nokto. Tra la tuta jaro. Tra la libroj, tra la gazetoj. Pelu mizeron tra la pordo, ĝi revenos tra la fenestro.

TRANS — Trans (sur la alia bordo de) la rivero estas arbaro. Trans la monto. La amerika kontinento kuŝas trans la oceano. Belaj rakontoj el trans la montoj.

NOTOJ

◆ 1. *Inter iuj prepozicioj estas pli aŭ malpli granda proksimeco laŭ signifo kaj en kelkaj kazoj (sed ne ĉiam) oni povas uzi egale unu aŭ la alian el ili :*

APUD — ĈE : Apud (ĉe) la tablo (sed : ĉe ni — ne : apud ni, en senco : en nia hejmo ; ĉe tiuj vortoj — ne : apud tiuj vortoj).

AL — KONTRAŬ : Kuri al (kontraŭ) la danĝera loko.

EN — DUM : En (dum) decembro, en (dum) dormo.

EL — INTER : Plej klera el (inter) ni.

EL — DE : Li venas el (de) la vilaĝo. Ŝtofo el (de) lano.

LAŬ — PRETER : Laŭ (preter) la rivero (laŭ = preter, sed samtempe paralele al la fluo de la akvo, ne kontraŭ ĝi).

ktp.

Post la verbo danki oni uzas ordinare akuzativan komplementon : Mi dankas vin. Sed iuj — precipe la slovoj — uzas ankaŭ nerektan komplementon kun la prepozicio al : Mi dankas al vi (komparu : dank' al dio).

Post la verbo simpatii kelkiuj uzas la prepozicio kun : ŝi simpatias kun li. *Preferinde* : ŝi simpatias al li (ŝia simpatio estas direktata al li).

Speciale pri : POR, PRI, PRO.

Por — Destine al, en utilo, intereso de...

Pri — Kiel objekto de parolo, pensado, ktp.

Pro — Kaŭze de...

Por kiu vi zorgas? (kiu estas la celo, la destinato de viaj zorgoj?).

Pri kiu vi zorgas (kiu estas la objekto de viaj zorgoj?).

Pro kiu vi zorgas? (kiu kaŭzas ke vi havu zorgojn?).

Si ploras { por sia frato (por lia utilo, por helpi, savi lin).
pri sia frato (li estas objekto de ŝia ploro).
pro sia frato (li estas la kaŭzo de ŝia ploro, li kaŭzis — per siaj agoj, sia konduto — ke ŝi ploru.


Por (pri) ĉio li estas la kulpa.

◆ 3. La prepoziciojn oni povas uzi ankaŭ kiel prefiksojn : eniri, eldoni, deveni, alpaŝi, trapasi, preterlasi, interrompi, kontraŭmeti, perlabori, ktp.

◆ 3. De la prepozicioj oni povas formi ankaŭ aliajn gramatikajn kategoriojn kaj ankaŭ formi novajn vortojn helpe de afiksoj : anstataŭi, apuda, ĉirkaŭi, ĉirkaŭe, ekstera, ekstere, kontraŭa, kontraŭdiri, kontraŭetari, kroma, pere senpere, peri, posta, poste, suba, sube, supera, ktp.

Korektu en la unua leciono : p. 102, linio 6 de supre : Antaŭ la vertoj « ĉar ĝin antaŭiras » mankas la vortoj : « ankaŭ la substantivo abonantoj ne havas la finaĵon n ».

Pro tro abunda materialo ne eblis aperigi la lecionon de P. Babin : « Lernu per biltoj ».



ESEOJ I, BELETRO. — de Gaston WARINGHIEN. *Kovrilo de John Hartley. Portreto de la aŭtoro.* — *Stafeto, Belliteratura eldonserio*, 6. — J. REGULO, *Eldonisto, La laguna, Kanariaj Insuloj*, 1956. — 16 x 22,5 cm. 236 p. — Prezo 1.80 us. dol. plus sendokostoj.

Jen seriozega, jen ŝercema, li certe estas aplikanto de la instruo kuŝanta en la « pedagogia gruko » de KUMBEL :

Kiu ŝercon ŝerce prenas
kaj severon nur serioze,
tiu fakte malkomprenas
ambaŭ grandioze.

Efektive vidu ekzemple, kiel severe li traktas la « ŝercologion » malgraŭ la fantasta envolva prezento...

Ke li profunde amas la lingvon estas jam sentebla ĉe nura lego : oni havas impreson de majstra, solida kaj nuancita lingvo-manipulado : sed tri eseoj : « la tradukarto », « la lingvistika valoro de la poezio » kaj « Esperanto kaj la kompara literaturo » estas aparte rivelaj.

Interalie oni komprenas, ke WARINGHIEN havis de longe ĝeneralan ŝaton al Esperanto sed ke koncerne detalojn li ne blinde aplaudis ĉion, kvankam por li tio estis faktoj. Li tiam komparis kun solvoj de aliaj sistemoj kaj, krome kiel biografo de D-ro ZAMENHOF, iom post iom rekonstruis en si la spertojn aŭ pensojn de la Majstro : li tiel povas doni almenaŭ ĝeneralan klarigon pri vortoj, laŭ aliaj, « miselektitaj ». Tio anoncas al ni tre frandan duan volumon : *Eseoj II : Lingvistiko*.

Kaj se la « *Eseoj* » per si mem estas inaŭguro, kiel nova ĝenro en nia literaturo, la tria parto de l'volumo : la partoj pri kompara literaturo estas duobla inaŭguro, « fianĉigo » kiel mem diras la aŭtoro, kiu metas nian lingvon ĉe l'pinto de la literaturo internacia ! Feliĉaj la esperantistoj : ili nun povos ĝui raran plezuron rezervitan ĝis nun al kelkaj nuraj poliglotoj. Sed tion ili ŝuldas kaj al nia Esperanto kaj al niaj plurlingvaj kleruloj ; sekvu aliaj verkoj de la aŭtoro kaj verkoj de aliaj !

Tiun senprecedencan verkon nepre posedu ĉiu klera esperantisto, ĉiu por ĉiu Esperanto ne estas iu dimanĉa ludilo, sed vera kulturlingvo ; li trovas en ĝi grandan lingvan ĝuon kaj abundan spiritan frandon, kiun ne elĉerpos unu lego.

A. A.

Profesoro WARINGHIEN estas ĉefe konata kiel la vortaristo, kiel la kunaŭtoro ankaŭ de la Plena Gramatiko, tiu verko laŭ iuj malutila, aŭ kiel la akademiano. Tamen en la Nica Literatura Revuo artikoloj ekz-e pri la « Tri Koboldoj », Kabaredo sub ĉefa respondeco de Schwartz, montras al ni absolute alian faceton de nia eminentulo. Ni ne parolu pri aliaj, altliteraturaj, artikoloj, nek pri tiu majesta rekreo de la robajoj de Omar KAJAM... Li ja ne estas, kiel oni povas konjekti, iu nura seka vortaristo !

Foto ĉe la komenco de l'libro montras al ni ridemajn, viglajn okulojn, pintan rektan nazon, buŝon, iome antaŭen tiratan. La tuto donas impreson de sagaco, de vigla kaj originala sprito kun profunda ridemo kaj bonkora ironio : de la profesoro « pioĉanta » el dikaj libroj, de la vortaristo restas nur la dikaj okulvitroj kiuj volas esti severaj...

Tiu rapida portreto ŝajne plene konkordas kun la impresoj kiujn oni ricevas el la lego de la eseoj mem kie la aŭtoro sin rivelas per sia juĝo kaj rezono super plej variaj temoj literaturaj kaj ankaŭ per sia bonhumoro kaj sprito.

Vasta klero, etendiĝanta tra la literaturoj de Okcidento kaj ĝis Persio kaj Japanio ; riĉa dokumentado, kiu scias kiel detektivo reiri ĝis la fonto de legendo, kiel ekzemple por la klarigo de la babela konfuzo aŭ por eltrovo de la inspirfonto de Dante en ties priskribo de la Infero ; tre varia elekto de la temoj kiuj krome sentigas ne nur la esperantiston kiu profunde — kvankam ne blinde, ne fanate, sed prudente, post pripensoj — amas sian lingvon, uzas nuancitajn esprimojn kaj eĉ kreas *ĝuvekajn* novaĵojn, sed ankaŭ la homaraniston, disĉiplon de Zamenhoj aŭ ĉe en kelkaj lokoj la kleran sennaciiston, disĉiplon de Lanti. Lia patrio estas la mondo kiun devos regi la racio kaj kie estas parolataj tre diversaj lokaj dialektoj kaj unu juna lingvo : ĉiuj dialektoj kulture helpu la lingvon !

Distra Pago

KONKURSO N° 1.

Gajnintoj : S-ro E. Calvet, S-ro Caubel, S-ro Chevalier, D-ro Fr. Couwenberg, F-ino Deygas, D-ro Jaromir Jermar, S-ino Lavallée, S-ro Lenel, F-ino Texier, S-ino Villette gajnis 2 poentojn.

S-ro Letendre gajnis 1 poenton.

Ni gratulas ĉiujn.

Post tiu konkurso F-ino Texier gajnis 345-frankan libron.

KONKURSO N° 2.

Jen la solvo :

Horizontale. — 1. Prezidanto ; 2. A. Monero, N ; 3. Ta, Naft, Ja ; 4. RBT, Bi, RAT ; 5. Orel, Imuna ; 6. Lumbo, Obut ; 7. Apo, Ko, Lai ; 8. NT, Fumo, RM ; 9. D. Dolaro, O ; 10. Onasergnok.

Vertikale. — 1. Patrolando ; 2. R. Abrupt, N ; 3. Em, Temo, Da ; 4. Zon, LB, Fos ; 5. Inab, Okule ; 6. Defii, Omar ; 7. Art, Mo, Org ; 8. No, Rubl, On ; 9. T, Januar, O ; 10. Onatatumok.

Gajnintoj : S-ino Arnould, S-ro E. Calvet, S-ro Caubel, S-ro Chevalier, D-ro Fr. Couwenberg, F-ino Deygas, S-ro Génuit, Ges-oj Lanz, S-ro Le Coze, S-ino Robin, S-ro Rochery, F-ino Texier, S-ino Gudala Thénée gajnis 2 poentojn.

S-ino Lavallée, S-ro Lenel gajnis 1 poenton.

Gratulojn al ĉiuj.

KONKURSO N° 4

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2					■	■				
3				■			■			
4			■					■		
5		■							■	
6		■							■	
7			■					■		
8				■			■			
9				■	■					
10										

Horizontale :

1. Publika elmontrado.
2. Insekteto ; Riski sumon en konkuro.
3. Inverse kaj fonetike : grandega manĝebla nukso ; Fonetike : Korta birdo ; Apartigita parto de spirita verko (r).
4. Malfacile uzebla prepozicio ; Fluaĵo. en kiu oni metas iun por kuraci ; Kapo de sangosuĉa insekto.

5. Transmara lando.
6. Malĝustaj opinioj.
7. Komenco de infekta febro ; Inverse : Riverego ; Participa finaĵo.
8. Ekstrema flanko de konstruo ; Verba finaĵo ; Inverse : duona parto de facile klasigebla papera folieto.
9. Meti je dispono de iu ; Inverse : ne plia ol.
10. Igi ion oficiala.

Vertikale :

1. Ago transporti eksterlanden.
2. Franda bakajo ; Inverse : organo de vegetaĵo (r).
3. Inverse kaj fonetike : Grandega homo ; Konjunkcio ; Persona pronomo.
4. Prepozicio ; Io, kio malhelpas ; Inverse : Persona pronomo.
5. Organa tubo.
6. Eligis akran bruon.
7. Inverse : Persona pronomo ; Inverse : kruciĝejo ; Prepozicio.
8. Bulbo (r) ; Substantiva finaĵo ; Moviĝi de iu loko al alia.
9. Inverse : sciigi al iu, ke oni deziras ion de li ; Inverse : musteloideo.
10. Inverse : Daŭra publika aŭ privata organizo.

Por bona solvo, vi ricevos 2 poentojn.

Bonvolu sendi viajn solvojn, ĝis la 25-a de la venonta monato, al S-ro Gullot, Cours de la 4^e République, Gaillard, Haute-Savoie (Francujo).

ANONCETOJ

« 30 estontaj geinstruistoj deziras korespondi kaj interŝanĝi il r. k. kun la tuta mondo. Skribu al adreso de gvidanto : Jan Polzer, U pivovaru 4. Olomouc - V. Ĉeĥoslovakujo. »

Altlerneja Instruistino pri okcidenta literaturo, Doc. Nina Selomova (Sovet-Unio, Latvia S.S.R., Liepaja, K. Marksa iela 43 d.z. 6) deziras korespondadi kun specialistoj.

Gekorespondantojn per leteroj kaj il. p. k el ĉiuj landoj por siaj grupanoj serĉas Peter Anso, Estonia S.S.R., Tartu, Kajtani 24-1. Sendu ankaŭ diversajn esperantaĵojn, ĉar dum militempo mi perdis ĉion.

La sama samideano kiu ŝajne provas reorganizi la movadon en Estonio petas respondojn al jenaj demandoj :

- 1) Kiun materialon kolekti por organizi superan kurson ?
- 2) Kiun regularon sekvi por organizi Esperanto-ekzamenojn ?
- 3) Cu vi konas adresojn de Universitataj E-instruistoj ?

Bonvola spertulo respondu rekte aŭ ĉeventuale per artikoleto en la revuo.

PERANTOJ DE I. P. R.

BRITA : « *The British Esperanto Association* », 140, Holland Park Avenue, London, W 11.

Jarabono : 8 ŝilingoj.

BULGARA : Ivan H. KRESTANOF, str. 6 Septemvri, 2., Sofia.

Jarabono : 8 levoj.

DANA : « *Dansk Esperanto-Forlag* », Ingemannsvej 9, Aabyhof. (Ĉek-konto :16.295).

Jarabono : 8 kronoj.

GERMANA : Helmut ROSSLER, 22 b, *Hechtsheim bei Mainz*, Friedensstr. 15. Ĉek-konto : 43 357 Ludwigshafen/Rhein.

Jarabono : 48 germanaj markoj.

HISPANA : E. CALVET, Pl. Gral Sanjurjo, 7, Tarragona. (Konto n° 956-293 ĉe « Banco Espanol de Credito »).

Jarabono : 44 pesetoj.

ITALA : Eduardo ZUMBO, Via del Carmine, 4, Torino.

Jarabono : 700 liroj.

JUGOSLAVA : Josip VAJDLIH, Podolje 15, Zagreb. (Ĉekkonto : Cradska Ŝtedisnica Zagreb, 406-606/I br 46 53).

Jarabono : 330 dinaroj

NORVEGA : Erling HOLTEN, *Leangen i Strinda*.

Jarabono : 8,50 kronoj.

SOVET-UNIA : Roberto DVORKIN, Esperanto-Sekcio de Kulturdomo, Leningrad, 22, Kirovskij 42.

SUOMA : Joel VILKI, *Somero*, poŝtkonto : Tu 60 253.

Jarabono : 300 suomaj markoj.

SVEDA : « *Eldona Societo Esperanto* », Box 19071, Stockholm (Poŝtĉeka Konto : 578).

Jarabono : 6 kronoj.

USONA : Jarvis E. BUSH, 3.700 North 75-th Street, Milwaukee 16, Wisconsin.

* *

ALIAJ LANDOJ : Sin turni al nia administranto : E. BIDOIT, 6 rue de la Paix. Baugé (M.-et-L.) Francio. (Poŝtĉeka konto : 143-867 Nantes). Provizore la landaj perantoj kaj ĉefdelegitoj de U.E.A. peras la abonojn. Jarabono : 400 francaj frankoj aŭ egalvaloro.

Ni daŭre serĉas perantojn.



La Esperantista Kulturdomo

Kastelo « GRÉSILLON »
BAUGÉ (M.-et-L.) Francio
Tél. 34

FRANCA KULTURDOMO

Restadoj dum somero 1957

La Kastelo Grésillon estos malfermita de la 1-a de Junio ĝis la 14-a de Septembro 1957.

1-a Periodo : 1-an de Junio — 14-an de Julio

Kursoj de Esperanto por komencantoj — Instruado de amatora bindarto
Turismaj karavanoj

2-a Periodo : 15-an de Julio — 24-an de Julio

Sensacia Manifestacio :

Kulturaj Internaciaj Ferioj

Kun Profesoroj AULD, LAPENNA, WARINGHIEN,
Dro ALBAULT kaj Ing. WATIER

3-a Periodo : 25-an de Julio — 9-an de Aŭgusto

La Franca Lingvo

por alilandaj samideanoj

Eksterordinare bona metodo por instrui rapide la francan lingvon pere de Esperanto, kursoj por komencantoj kaj por perefktigemuloj. Necesas uzi sufiĉe bone Esperanton.

4-a Periodo : 10-an de Aŭgusto — 31-an de Aŭgusto

Somera Lernejo - Tri kursoj de Esperanto

5-a Periodo : 1-an de Septembro — 14-an de Septembro

Fakaj Renkontiĝoj - Liberaj Ferioj